

Skemo de la registrado de la vortkunmetaĵoj laŭ la modelo de la
ENCIKLOPEKIA VORTARO de Wüster

Ni prezentas al la E-aj fakvortaristoj la ĉi suban skemon, laŭ kiu ili alfabete envicigu kunmetitajn fakvortojn, ne nur en memstaraj alfabete aranĝotaj terminaroj, sed ankaŭ en ĉiuj E-aj vortlistoj aldonataj anekse al internciaj plurlingvaj vortaroj.

Vico interne de ĉiu el la artikoloj de Esperanta vortlisto	Ekzemplo (artikolo »brul«)
(1) Radiko (kapvorto de la artikolo)	brul/i
(2) Radiko plus finaĵo	==a ==o
(3) Radiko plus sufikso	==ado ==aĵo ==aĵisto ==ebla ==ejo ==eti ==igi ==ilo
(4) Radiko plus dua (aldonita) radiko	==difekto ==faro ==faristo ==ligno ==materialo ==rezista materialo ==rezista pordo ==ŝirmado ==vundo
(5) Prefikso, prefikse uzata prepozicio aŭ kvazaŭprefikso plus radiko kaj kunmetaĵoj konsistantaj el radiko plus antaŭa kroma radiko aŭ plus adjektiva atributo	batalo kontraŭ==o ek==i ek==iĝo ek==igilo ek==a centro ek==a temperaturo ek==igi for==igi interna==o krim==igi limigita==o objekto de ==o pun==igi tegment==o

415.4 (= 408.92, — adoro)

TEKNIKAJ PSEUDOSUFIKSOJ

En TC de ISAE oni diskutis antaŭ kelkaj jaroj pri la vorfinaĵoj — oro kaj — ator^o. La Akademio de Esperanto ne konfirmis ilin kiel pseudosufiksojn, sed atribuis al ili la karakteron de radikeroj.

Inĝ Edward M. Rosher prezentas al la Terminologia Centro en la antaŭparolo da sia Fervoja Terminaro Angla-Esperanta (traduko de LEXIQUE TECHNIQUE FERROVIAIRE) kroman vorteron, nome **adoro**, kiun li intencas enkonduki kiel pseudosufikson. Jen lia argumentado:

»Neologismoj. — Tio, kio plejeble estos diskutata estas »adoro«, proponata kiel sufikso por indiki ian ajn grandan maŝinon por kiu necesas provizi solidan bazon kaj eble firmiksi ĝin per boltoj.

Ni havas ilojn uzatajn permane aŭ tenatajn en speciala tenilo, ekz-e »kliktenilo«. Troviĝas ankaŭ benk-iloj, ekz-e benkdriloj, malpezaj mortez-maŝinoj, torniloj, k. s. Kvankam iom pezaj, ili estas moveblaj ankaŭ al aliaj pozicioj aŭ lokoj. Denove ekzistas eĉ pli pezaj iloj: relsigiloj, relfreziloj, relfleksiloj eble funkciigataj per potenco, ankoraŭ nenataj »maŝinoj«.

Fine, ni havas pezegajn maŝinojn, ekz-e aleziloj, freziloj, torniloj por pezaj laboraĵoj, robotmaŝinoj, pludriloj, premegiloj, k. t. p. Ĉi tiuj estas firme fiksataj. Ni proponas nomi ilin alezadoro, frezadoro, tornadoro, robotadoro, driladoro, premadoro, kaj eĉ maŝinadoro por maŝino kiu fabrikas maŝinojn. La sufikso estas pli mallonga kaj samtempe indikas la tipon de maŝino.

Ĉi tiu neologismo estis unue proponita de la itala inĝeniero Rinaldo Orenge kaj ŝajnas al la tradukinto, ke ĝi kontentigas bezonon. Li opinias, ke devas ne ekzisti dubosenco ĉe teknikaj terminoj.

La ebleco traduki miŝinadoro (= maŝino por fabriki maŝinojn) kiel »la adoro al maŝino« kiel sugestite de unu kritikinto, ne povas ricevi gravan akcepton en teknika uzo. Notu: la sufikso estas »ADOR«, ne »ad-or«.

T. C. prezentas la ĉi supran proponon de Rosher pro diskutado en vasta rondo de lingvistoj kaj inĝenieroj.

R. Haferkorn